

AVE NO 34 (2009) - Homaj Rajtoj kaj Socialaj aferoj

Civitana katastrofo: Granda Ajatollao Hussein Ali Montaseri mortis. Li estis unu el la plestaraj kritikantoj de la nuna sistemo, kiu estas konstruita sur balot-fraudo kaj perforto kontraŭ kritikantoj. Jam estis ekzekutitaj 79 personoj kiuj partoprenis la manifestaciojn, milaj aliaj terture perfortitaj. La ekonomio malbone funkcias. Kiom longe ...

Ni lernis el la historio (SU, Romanio, Nazi-Germanio, Rugha Kambogho kaj Chinio, Usono (en Vjetnamio, Peru, ktp)..) ke tiaj sistemoj ne dauras eterne. Sed bedaurinde por la honestaj nuntempaj homoj en tiuj landoj signifas katastrofo.

La registaro de P.R.Chinio - malgrau ekonomie forta - ankoraŭ nuntempe ne akceptas kritikon, eĉ ne konstruivan - ili preferas ke lernantoj pereas je ter-tremoj pro lernejo-konstruado laŭ fusha maniero, kashita pere de korupcio, k.s.. LIU Xiaobo nun estas kondamnita al 11 jaroj pro "subfosado de la registara forto", ĉefe ĉar li subskribis la "Charton 08" (rememore al la ĉehha "Charto 77", temas pri 19 postuloj por modernigi P.R.Chinion. "Charta 08" (div-aj lingvoj) http://de.wikipedia.org/wiki/Charta_08 "Charta 08" (en) <http://www.nybooks.com/articles/22210> (laŭ Bad. Ztg., 2009-12-24, p.5, kaj "taz" 2009-12-24, p.12)

Certe ankau en multaj aliaj landoj okazas agoj de la registaro kaj de aliaj homoj kiuj kontraŭas la Homajn Rajtojn. Sed kutime libera kaj respondeca ĵurnalismo malkashas la aferojn.

Mortpuno: en Usono intertempe estas liberigitaj multaj (pli ol 100) mortpunitaj senkulpuloj dank' al DNA-analizo. Espereble Usono baldau abolicios la mortpunon entute, kaj ankau Chinio, Irano, k.a.. Kaj ni salutas nian amikon N.I.Sekvoyah kiu pro la malegaleca ne-justa pun-sistemo estas mortpunita kaj malliberigita preskau 20 jarojn. Espereble li ricevos la ŝancon al vere homeca kaj justa proceso. Rusio aboliciis la mortpunon, sed tamen aparte la vivo de ĵurnalistoj kaj defendantoj de la Homaj Rajtoj estas minacataj - mortpafigi homon ja egalas al mortpuno (eĉ sen (justa) proceso). Aparte pro tio, ke la registaro fakte ne vere kontraŭas tiun metodon.

Europa Konsilio - Minoritataj Lingvoj - nova eldono de la gazeto
<http://www.ecml.at/gazette/gazette-15-E.htm>

NOV-17: Internacia Tago de Studentoj: rememore al tiuj studentoj kiuj estis viktimoj de totalitarismaj reĝimoj (aktuale: Irano Kolombio, Belorusio); kaj samtempe la rolon de studentoj pri demokratio kaj partoprenon (en Europo). Okazis manifestacioj de studentoj en pluraj europaj landoj por plibonigi la instruo-situacion k.a..

(laŭ instigo de FYEG, Federacio de Junaj Europaj Verduloj): <http://www.fyeg.org/cms/>

Un-Konferenco kontraŭ Korupto / por Travideblo - aktuala tutmonda tabelo:
(de,en) <http://www.transparency.de> <http://transparency.de/Tabellarisches-Ranking.1526.0.html>

2009-11-19 La 3 novaj reprezentantoj por EU estas elektitaj:

- EU-Prezidanto: la belga Hermann Van Rompuy (62).

La brita Daily Telegraph lin atakis pro la fakto ke li estis inter tiuj, kiuj verkis la manifeston de belgaj kristan-demokratuloj; tiu manifesto havis federistan sintenon pri Europo "eĉ favorante la simbolojn de la Unio (moton, himnon, standardon kaj europajn tagojn), proprajn al nacio".

- EU-Alta Reprezentanto por Ekstera Politiko: la angla Catherine Ashton (53).

- Ĝenerala Sekretario de la Europa Konsilio (de la ministroj): denove la franco Pierre de Boisson.

Tio estas ŝlosila pozicio se temas pri projektoj kaj kompromisoj.

Konsiderinte ilian federismon, temas sume pri kontentiga solvo.

2009-11-13 La Lisbona traktato, konfirmata finfine de ĉiuj 27 EU membroŝtatoj, estas modifiga traktato; ĝi ekfunkciigas, de januaro 2010, la 3 EU-Traktatojn

- TEU=Traktato pri EU (la fundamenta traktato de EU)

- TFEU=Traktato pri la Funkciado de EU (la aplika traktato de TEU)

- ChFR=Charto de Fundamentaj Rajtoj

Detalaj informoj en Esperanto: http://eo.wikipedia.org/wiki/Traktato_de_Lisbono

- pri TEU kaj TFEU (de): <http://eur-lex.europa.eu/JOHtml.do?uri=OJ:C:2008:115:SOM:DE:HTML>
- esperante pri ChFR en <http://europa.free.fr/konstitucio.htm>
nur de la art. 61 ghis la art. 114

> Kio pri la Euratom? Mi trovis neniun citajhon. Se vi iras en http://it.wikipedia.org/wiki/Trattato_di_Lisbona kvankvam temas pri itallingva teksto, fine de la pagho, vi trovos tabelon el kiu eblas dedukti
- ke la tri traktatoj neniel rilatas al Euratom
- ke dauras la valido de la Euratom-traktato.

> kio pri Montanunion? Legu en TEU: art. 3, TFEU: art. 119-126, 134,-135

Pri medio kaj klimataj shanghoj legu en TFEU: art. 191-193
(J-K Rinaldo el Padova.IT.EU kaj mw)

Pri la verduloj en Italio: ili estas vere en la kacho... mi pensas ke ili povus solvi la aferon nun kunlaborante kun la radikaloj italaj (ghi estas forto nek dekstra nek maldekstra; ili elektas lau la momento la temoj pri kiuj batali, plej ofte temoj pri la rajtoj) bedaurinde emas hegemonii. Sed la verduloj, kune laborante, povus porti kun si la temojn de la medio kaj del ekologio. (lau J-K Rinaldo) Komento (mw): Verduloj havis komunan frakcion en la EP ekde 1984 (?), sed tio ne dauris tre longe.

Rusio - emo respekti la Homajn Rajtojn kaj la Jurshtatecon altighas:
Individuaj policistoj protestas pro maljusteco. Ekz-e en la rpubliko Komi okazis incendio, la polico arestis du homojn, ili estis kondamnitaj en rapida proceso al viv-longa malliberejo. La vic-prokuroro G. Chekalin esploris la aferon kaj trovis, ke ili estis ne-kulpaj, sed ke la raporto de la polico estis fikciaj; li turnighis al la prokuroro - sed tiu malshatis la intervenon kaj maldungigis la vic-prokuroron (antau du jaroj). Dank' al la Nova Jurshtata Politiko de la prezidento, li kuraghighis kaj apelaciis al Medwedev per video-mesagho en la interreto, por finfine malaresti la nekulpulojn.
Ankau majoro A. Dymowski elvochis kaj petis audiencon je la chefministro Putin. ankau li estis maldungita. Sed nun tuta Rusio - kaj ankau la Mondo - atendas chu la jurshtataj pricipoj superas la koruptecon. (lau KH Donath, taz, 2009-11-17, p.11)

Rusio - Parolado de la Prezidento Medwedev - io mankas:
Lau la analisto David Clark de The Times (2009-11-13), ankoraŭ estas manketo inter la retoriko kaj la agado de la moderniga programo de Prezidento de Rusio, D. Medwedev. Krome, la "dua manifestacia proceso kontraŭ Mikhail Khodorkovsky" subfosas lian aserton promocii la jurshtaton.
Rusio - denove pri la proceso kontraŭ M.B. Khodorkovsky - kiu dauradas; supozeble tiom longe ghis Putin ne plu interesighas je politiko !?! Jen interese leginda leterintershangho kun la verkistino Lyudmila Ulickaya: <http://www.khodorkovskycenter.com/news-resources/stories/khodorkovsky-s-correspondence-russian-novelist-lyudmila-ulitskaya>

TUTMONDA MARSHADO POR PACO: <http://www.theworldmarch.org/index.php?lang=epo>

Ghi okazas sur la kvin kontinentoj. Ghi kunligas homojn, kiuj engaghighas por paco kaj senperforto. Elkore salutas Mirejo Grosjean

2009-10-01 P.R. Chinio festas la 60-jarighon de la shtatigo: Duonan gratulon al la lando, kiu dank al Mao Dse Dong sukcesis liberighi el fremda sklaveco, kaj post malfacila vojo nun trovighas inter la plej povaj shtatoj. Kaj Duone: Kondolenco indas al tiuj etnoj kiuj ne kun-festas (tibetanoj, ujuoj kaj eble aliaj) kaj krome al tiuj homoj de la han-etno kiuj ne povas kun-festi char ili au estas politikaj malliberuloj au verkistoj kiuj ne rajtas publikigi siajn verkojn en la P.R.Chinio.

En Saudi-Arabio malfermis Internacia Universitato, Regho Abdullah Universitato por Scienco kaj Teknologio (KAUST) - aparte nova afero: ambau seksoj studas kune, kaj ne ekzistas devo porti la kaptukon. Plimulto estas eksterlandanoj. (lau "taz", 2009-09-24, p.17)
Kontraste al tio: en Irano pli severa estas la "islamigo" de chiuj universitatoj; ekz-e per 40%-a kvoto por Basidsh-milicistoj. (lau "taz", 2009-09-23, P.11)

2009-09-08 Rehabilitado de "milito-perfiduloj" en Germanio:
Iom post iom okazas la prilaboro de la dua mond-milito kaj la nazia epoko en Germanio.

Jam 2002 - kiam la Verduloj estis en koalicio kun la SPD - la federacia parlamento korektis la nazi-epokan leghon kaj tiamaniere donis rehabilitadon al milit-dizertintoj. Nun - dank' al esploroj de milit-historiisto Wolfram Wette (k.a.) kaj post iniciato de la Maldekstra Partio - finfine chiuj partioj subtenis la rehabilitadon de homoj kiuj estis mort-kondamnitaj kiel "milito-perfiduloj" flanke de nazia (milit-)justico. Tio ne plu helpas al tiuj 30.000 plejmulte ekzekutitaj, sed fakte al la familioj, kiuj re-ricevas la honoron de sia familiano; kaj eble ankau subtenas la leghdonon gherale pri tio, kio okazas sub fiaj registaroj. Parolado de Wolfgang Wieland (Verduloj): http://www.gruene-bundestag.de/cms/bundestagsreden/dok/302/302405.aufhebung_nationalsozialistischer_unrech.html
Federacia Parlamento de Germanio: Legh-propono de 2009-07-01 Drucksache 16/13654

Popola Respubliko de Chinio ne emas diskuti kun kritikistoj.

La gastolando de la germana librofoiro en Frankfurt chijare estas P.R.Chinio.

Je la publika prezento (simpozio) ankau venis Dai Qing kaj Bei Ling, disidentoj en Chinio (malsamopiniataj), kiuj estis invititaj de la germana PEN-Klubo, sed (fakte) ne ricevis la permeson partopreni flanke de la china registaro. Pro ilia parolado la china delegacio forlasis la komencan kunvenon, malgrau la fakto ke Dai Qing ech laudis certajn plibonigojn rilate la opinio-liberecon en P.R.Chinio. (HR, 2009-09-12)

Charto de ELIANT: Eŭropa Alianco de Iniciatoj por Aplikata Antroposofio / ELIANT

Homa digno kaj individua evoluado estas kernaj valoroj de Eŭropa kulturo, al kies evoluo la iniciatoj de Rudolf Steiner pri aplikata antroposofio kontribuis dum pli ol 80 jaroj. Precipe en la fakoj de agrikulturo, edukado, edukado por specialaj bezonoj kaj medikamentoj evoluighis humanaj alproksimiĝoj de la plej alta kvalito, kaj trovis tutmondan agnoskon kaj estimon. La Alianca tasko estos sekurigi laŭleĝan sekurigon por tiaj iniciatoj kaj plu-evoluigi ilin kiel kontribuado al la plua formado de Eŭropo. Ili jam kolektis pli ol 900.000 da subskriboj; bezonata estos 1 miliono - lau la iama traktato de Lisabono. <http://www.eliant.eu>

Mireille Grosjean kaj japanaj samideanoj preparis retejon jam en pluraj lingvoj:

<http://www.alvoko-al-mondpaco.org>

Ghi enhavas 9 proponojn kiujn vi povas akcepti au preterlasi. Parto de ili nur rilatas al Japanio.

La teksto en Esperanto parte estas ankoraŭ en la franca – k. ordonoj por la manipulado de la paghoj.

Kiel en chiuj landoj, tiel ankau en Rusio estas malrichaj familioj kies infano/membro malsanighis je kancero, leukemio k.s. kaj esperas resanighi per novaj medikamentoj au ricevo de bazaj cheloj de tauga donacinto. Bedaurinde Rusio ne havas sufiche da mono por financi tion...

Ech ankoraŭ ne ekzistas en la granda Rusio datenaro de potencialaj donacintoj de tiaj cheloj. La retejo estas en la rusa, angla kaj germana. <http://www.advita.ru>

Irano - ni preghu por justa socio en Irano kaj aliaj landoj

Nekredeble kruela konduto kontraŭ opozicio, pro la neeblo jes-i la malghustan baloton, montras ke la diablo (ni rememoru la romanon "La Majstro kaj Margarita", kaj simple la nazi-fashismajn kaj Stalinisman teroron kaj plurajn aliajn) superis en la Dia Shtato Irano.

Ni preghu - chiu lau sia religio au mond-koncepto - por la (sen-sanga) fino de tiaj maljustaj reghimoj.

Rusa socio - por ne troshuti vian poshtkeston - koncize: La murdo al Anna Politkovskaja estas denove en la tribunalo, sed denove oni rezignis pri funda esploro. La pafisto ja tutvershajne laboris lau mendo. Anna estas nur unu ekzemplo de pluraj murditaj jhurnalistoj en Rusio.

Ahmadinedshad estas oficialigita.

Peticio por haltigi la krimojn de la irana registaro kontraŭ granda parto de sia popolo.

(en, ir) <http://www.petitioniran.com/?page=petition&pid=YLT5392>

Grenlando ighis sendependa - gratulon - kaj dankon al la dana registaro ke tio efektivighis.

Ni deziras al la nova shtato bonan politikon en malfacilaj cirkonstancoj - eble iu de vi povas verki resumon pri la lando kaj pri la nunaj problemoj.

Por pli bone kompreni tiun apartan regionon mi rekomendas la specialan kajeron de "Norda Prismo": de la jaro 1964 (??) numero dedichita al la gronlanda popolo:

Naqitigaq una kalatdlinut pigitiparput !

La bulteno Monda Solidareco numero 97 estas de nun havebla el la kutima retadreso :
kaj de tie havebla ankaŭ en pdf-formato ambau formatoj per universala kodo UTF-8.
<http://www.globidar.org/solidareco/MS99EO.pdf>

2009-07-25 Irana Demokratio - Tutmonda Agado-tago.

Solidareco-agadoj kun la irana popolo okazos je la 25a de Julio en pli ol 60 urboj tutmonde:
<http://www.united4iran.org/locations>.

Eminentaj ekleziuloj en Irano malakceptis la falsigon de la elekto-rezultoj, kaj nun volas referendumo, chu la irana popolo akceptas la tiel elektitan prezidenton. (Iau "taz", 2009-07-23, p. 4))

P.R.Chinio rezignas partopreni la film-festivalon en Australio, char tie estos montrita ankaŭ filmo pri Rebiya Kadeer, "patrino de la ujugura autonomio". Estus pli saghe malferme diskuti tiajn pri-etnajn aferojn, anstataŭ bari chian diskuton.

Statistike la ne-han etnoj malpli bonshancis de la bona ekonomia evoluo de Chinio.

Ech la pilgrimado de la ujgruoj al Mekka estas kanalizita de la ŝtato, kaj pli multekosta.

(Iau B. Bartsch, Badische Zeitung, 2009-07-23, p.4)

Defendo de interreta libereco en Europo:

nova partio "Piratoj" partoprenis la baloton al la EP; sveda pirato estis sukcese elektita kaj nun kunlaboras ene de la frakcio de la Verduloj kaj Regionalistoj.

Kompreneble AVE ne favoras novajn partiojn kun temoj kiujn la Verduloj jam prezentas, sed la demokratio ebligas tion. Ekzemple la Verdaj Partioj preferas neniigon de ret-paghoj kiuj estas kontraŭ la homa digno (diskutinde kie estas la limoj ..), anstataŭ bari paghojn. <http://www.piratenpartei.de> (Iau "taz", 2009-07-23, p. 13)

2009-07-07 Dume la protestoj en Irano daurigas, kaj islamaj scienculoj (de Qom) malakceptas la elkton de la eksa prezidento.

--

Okazis protest-manifestacio pro la mortigo de 2 ujguroj en Chinio en la Urumqi, chefurbo de la ujugura provinco Orienta Turkestan (chine: autonoma provinco XinJiang).

Pro tiuj manifestacioj estis mortigitaj (pli ol) 150 homoj kaj malliberigitaj pli ol 1000.

La reprezentantino de la eksilaj ujguroj, Rebiya Kadeer, ne lacighas paroli pri la "kultura popol-murdo" kio okazas tie. Jam loghas pli da han-chinoj en XinJiang ol ujguroj, k.s..Chiu provo diskuti veran autonomion de la provinco estas batita kruele. (Iau ARD, 2009-07-07)

2009-07-03 Komuna mocio de la parlamentanoj de plimulto de la partioj (CDU/CSU, SPD, FDP, Verduloj, sed evidente ne la Maldekstruloj) en la federacia parlamento de Germanio plendas direkte al la prezidento de Rusio, sekvi jur-shtatajn metodojn en la kazo de Mihhail Hhodorkovski (chefo de neniigita konzerno Jukos en Rusio). Legu pli je: <http://www.khodorkovskycenter.com/>

2009-07-05 Irano, chio en ordo ? Ne , malgrau nur malmultaj informoj venas, ekz-e pri la anoj de la brita ambasadejo. Kaj jen vi povas sekvi la aferon, kaj eble helpi (subteni la Rughan Krucon au Duonlunon). Jen <http://iran.whyweprotest.net/> ili informas regule - ili serchas tradukistojn en aliaj lingvoj (kiu esperantisto povas/emas ?) Kaj jam en Esperanto: <http://www.ipernity.com/blog/reza.torabi> Karaj, pri la demando chu la elektoj en Irano estis fraudaj, ekzistas nialingve artikolo pri opinienketo en Irano jhus antau la elektoj, el "Washington Post".

Jen: <http://mas-eo.org/article360.html> Bonan legadon! Vilhelmo Lutermano.

2009-06-19 La vendreda parolado de Khamenei en la universitato montris, ke li ne intencas trovi la veron, sed defendi tiun kiu pli agordas kun la sistemo.

Li ech diris, ke dubi ke la balotorezulto havas erarojn estas kontraŭ-islama. Kial li tamen koncedis, ke la opozicio rajtas cheesti la kontrolon de kelkaj (elektitaj de kiu ?) re-nombradoj.

Li malpermes manifestacion dum sabato. Por eviti stultan oferadon de homoj necesus daŭra "civitana malobeemo", kion jam montras la blogo de iu reza ;)

Lau niaj informoj el pluraj fontoj (ekz-e Deutschlandradio: honesta agado estus denove komenci la kompletan baloton, inkluzive de la allaso de virinoj al la kandidatigo.

Rekte el Irano:

- 1- Ekde la 15a oni okazigas "silentan manifestacion" sur la ĉefstratoj de Tehrano kaj la aliaj urboj tra la lando. Tiuj manifestacioj estas sen ajna slogano, oni silente marŝas sur la stratoj kaj levas la manojn montrante venkosignon. Dum noktoj je la 22a horo sur la tegmentoj oni krias kaj ripetas la sloganon "Allaho Akbar" (Allaho estas la plej granda). Oni povas konsideri la la registaro jam pli kaj pli perdas sin memfidon. Dum la pasintaj 30 jaroj (post la revolucio) neniam tiom da popoloj protestis kontraŭ la registaro. Tio kio estas tre studinda estas konduto de la protestantoj. Oni nenion kontraŭleĝon faras, simple silente sur stratoj proteste marŝas kaj malgraŭ policoj kiuj perforte kaj intence minacas la homojn oni ridas al ili kaj neniel reagis atakeme al ili kaj ĝuste pro tia konduto jam la polico ne plu aperas sur la stratoj (mi parolas pri Tehrano kaj pri la aliaj urboj mi ne havas konkretan informon). Je la 15a la polico komence intenci kontraŭi ajnan manifestacion ĉar oni ne havis "permesilo"n manifestacii sed rimarkante la oceanon de la homaro polico malaperis de la publiko.
- 2- Je la fino de la 15a manifestacio en "Azadi placo" en la stacio de duonmilita organizaĵo "Basiĝ" (branĉo de la Revolucio Gardanta Armeno-RGA) iuj pafis al la manifestaciantoj kaj laŭ la oficialaj raportoj 7 homoj estis mortigitaj kaj 29 vunditaj.
- 3- En la balotado konkurencis 4 kandidatoj nun 3 el tiuj protestas la rezultojn kaj nur Ahmadinejad estas kontenta! ŝajnas ke tiu afero mem estas signifoplena kio okazis!
- 4- Antaŭ horoj La Revolucio Gardanta Armeno (RGA) oficialae deklaris ke oni ne rajtas blogi kaj surretigi ajnan informon pri la kurantaj aferoj en Irano (imagu pri la afero kaj profundeco de la cenzurado).
- 5- Mehdi Karrubi kaj Mir Hosejn Musavi (2 kandidatoj kiuj forte plendas al la fraŭdoj okazintaj dum la balotado) deklaris ke la popolo ne timu kaj kuraĝe aperu sur la stratoj ĝis tiam kiam la ŝtato akceptu nuligon de la hontiga balotado.
- 6- Ahmadinejad antaŭ horoj en la kunsido de la ministraro dankesprimis de la irana popolo pro ili partopreno en la balotado (!?) li nenion diris pri miliono da homoj kiuj protestas al li kaj konsideras lin kiel mensogisto kaj fraŭdanto.
- 7- Morgaŭ okazos funebrceremonioj okaze la jam mortintoj dum la pasintagaj silentmanifestacioj. Oni intencas nigre vesti sin kaj en la moskeoj funebri. Je la 16a horo denove okazos silenta marŝado ekde Englab placo ĝis Azadi placo.
- 8- Vendrede Aĵatollaho Ĥamenei (La gvidanto de islama revolucio) estos imamo de vendredpreĝo, Mahdi Karrubi intencas fari grandan manifestacion kaj kun sian akompanantoj partopreni en la preĝado. Tiu ago se okazos estos unika tia speco protesto. Oni intencas "aŭdigi siajn protestoj al la okuloj de la altmoŝta gvidanto" ĉu ili sukcesos? mi ne povas respondi.
- 9- Feliĉe hodiaŭ ne okazis ajna malbona novaĵo pri mortigo de iu aŭ vundiĝo, ĉu la registaro jam komprenas kio okazas tra la lando? ĉu la polico pli saĝiĝis? mi esperas esti tiele.

Aveno 34 - 2009-06-14

Certe vi ankaŭ legis pri la manifestacioj en Irano; ĉar oni ne fidis al la tro bona baloto rezulto (62,x%) por la nuna prezidento Ahmadinedshad. La duaranga en la baloto, Musavi, postulis ripeti la baloton. Mi legis en gazeto pri diversaj indikoj rilate trompoj kaj ne justa konduto flanke de la registaro. Jam la ekskludo de virinoj (kiuj ja pretis) el la kandidateco kontraŭas la Homajn Rajtojn. Mi deziras ke la afero ne ighu sangovershado, sed denova proceduro sub travideblaj kontroleblecoj gvidos al akceptebla rezulto.

Aveno 34 - 2009-05-02

Barak Obama intertempe dejhorante kiel Usona prezidento pli ol 100 tagojn, komencis multajn riparojn pro la antaŭa politiko: subteni ne nur la bankojn sed ankaŭ la homojn en la financa krizo, agnoski la klimato-shanghighon, malpermesi torturon, finfi (kelkajn) ne-legalajn lau internacia legho malliberejojn, pacigi la Israelon kun la palestinanoj, paroli kun Irano ka, malprodukti la atombombojn tutmonde*.

(*Die Zeit, 2009-04-08, p.4)